# LA STROBILO

KONGRESA KURIERO DE L' 70a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN AUGSBURG 1985

sub la aŭspicio de MONATO internacia magazino sendependa, Antwerpen/Augsburg

*Internacia redakcio sub gvido de*
*Stefan Maul, Thomas Bormann kaj Paul Peeraerts*

N-ro 1
sabato, 3 aŭgusto


## LA STROBILO BONVENIGAS VIN EN AUGSBURG!

*Karaj kongresanoj, apud la multaj aliaj, kiuj bonvenigas vin en la urbo de l' 70a UK, ankaŭ la Kongresa Kuriero kore salutas vin kaj deziras al vi agrablan restadon!*
*Ke ĝi estu tia, por tio i.a. servas ankaŭ LA STROBILO, en kiu vi trovos dum la kongreso aktualajn informojn el la mondo kaj el la intima internacia mondo de l' kongreso. Sed la Kongresa Kuriero ankaŭ krome estas je via servo, ekzemple se vi volas meti en ĝi anoncon, anonceton aŭ rèklamon; tiukaze venu al la oficejo de LA STROBILO, kie vi ricevas koncernajn informojn.*
*Kaj kompreneble la internacia redaktantaro de l' kuriero estas danka pro viaj sugestoj, proponoj kaj kritikoj.*

### STROBILO

*Strobilo estas la konusforma frukto de diversaj arboj, ekzemple de l'* **cembro.** *La cembra strobilo estis antikva simbolo de fekundeco kaj romia legiona signo. Augsburg, fondita de romianoj, heredis de ili ankaŭ ĉi tiun simbolon: ĝi iĝis la urba blazono. Ke la aŭgsburganoj nomas ĝin* **Zirbelnuß**, *estas pravigebla per tio, ke efektive oni povas manĝi la cembronuksojn. Tamen ili malprave nomas la blazonon "nukso" - la blazono mem ja estas la* **strobilo**. *Kaj ĉar la Kongresa Kuriero kompreneble estas ekzakta, ni elektis por ĝi la titolon* **LA STROBILO**. *La blazonon aparte por la Kongresa Kuriero desegnis J. M. Ipfelkofer, ano de la LKK.*

LA STROBILO aperos sesfoje dum la 70a UK, en jenaj tagoj:
n-ro 1 sabato, 3 aŭgusto
n-ro 2 lundo, 5 aŭgusto
n-ro 3 mardo, 6 aŭgusto
n-ro 4 merkredo, 7 aŭgusto
n-ro 5 vendredo, 9 aŭgusto
n-ro 6 sabato, 10 aŭgusto

Do ĝi ne aperos dum dimanĉo kaj ĵaŭdo de l' kongresa semajno.
Dum la aper-tagoj vi povas ricevi vian senpagan ekzempleron ĉe la enirejo plej malfrue je la 9 h. Se vi venas al la kongresejo nur poste dum la tago, demandu ĉe la stando de MONATO/KONGRESA KURIERO.
Liveru raportojn por la kuriero plej malfrue ĝis la **20 h de l' antaŭa tago!**

## TAGO DE LA PACO

**Apartan kaj kroman akcenton ricevis la ĉi-jara UK per la engaĝiĝo de pluraj personoj pri la temo paco. Iomete vi povis legi pri la la Tago de la Paco jam en la kongreslibro p. 46. Jen kromaj kaj pli detalaj informoj pri ĉi tiu nova iniciato dum UK.**
LKK pro la aparta ligiteco de Aŭgsburgo al la temo de paco kaj pro la fakto, ke dum la kongresa semajno estas kaj la memortagoj de Hiroŝima kaj Nagasaki kaj la Pacofesto de Aŭgsburgo, jam tre frue planis, dediĉi apartan tagon al tiu ĉi temo. Pro organizaj obstakloj tamen ne eblis, dediĉi mardon (Hiroŝima) aŭ ĵaŭdon (Pacofesto) al la temo. Nun la Tago de la Paco do estas **lundo, 5 aŭgusto** - sed LKK opinias, ke ne tiom gravas, k i u n tagon oni prenas.

En la centro de la tago estas **La Ludo de la Paco** laŭ la libro de **Bernard Benson** kaj aranĝita por teatro de **Wolfgang Gutfleisch**. Prezentas ĝin lernantoj, kiuj speciale por la UK pro tio lernis Esperanton.
La "pacoludon" akompanas kaj kompletigas ekspozicio pri paco, kiun kompilis pluraj germanaj kaj japanaj esperantistoj; precipe kontribuis al ĝi MONATO per kolekto de artikoloj pri la temo.

La dua kulmino estas teatraĵo **La aŭgsburga kretocirklo**, scenigita novelo de **Bert Brecht**, la fama germana verkisto naskita en Aŭgsburgo. Por la teatro aranĝis ĝin la konata aŭgsburga Brecht-esploristo **Werner Frisch**, tradukis ĝin **Jomo Ipfelkofer**.
La "kretocirklo" traktas la temon paco en la individua, interhoma sfero.

Efektive, temas kaj ĉe la "pacoludo" kaj ĉe la "kretocirklo" pri **premieroj**, en la kazo de l' "kretocirklo" eĉ pri **mondpremiero**, ĉar la teatraĵon oni ĝis nun ne prezentis en germana lingvo!

### IKU petas helpon
### Invito al gazetar-konferenco

Okaze de la inaŭguro de la 33a sesio de la **Internacia Kongresa Universitato** okazos dimanĉon, de la 13a ĝis la 14a horo en salono Pickel (apud la restoracio de la kongresejo) gazetar-konferenco. Donos informojn pri la enpenetro de la Internacia Lingvo en la sciencojn la rektoro de IKU, profesoro d-ro **Frank**, kaj la unua prezidanto de la **Akademio Internacia de la Sciencoj SanMarino**, profesoro d-ro **Fabricio Pennacchietti.**

Pluraj germanlingvaj revuoj ne povos sendi ĵurnaliston sed petas raporton fare de sciencista kongresano. Help-pretaj kaj iom spertaj kongresanoj, kiuj komprenas la germanan, estas bonvenaj - ĉu por kontentigi la menciitajn raportopetojn, ĉu por memstare sendi raportojn al gazetoj, revu- kaj radio-redakcioj.

Speciala raporto pri la AIS San Marino estos donata samloke mardon de la 9a ĝis la 11a fare de speciala delegito el San Marino.

### NOVAJ FUNKCIULOJ

Kunlaborantoj en la laboro de LKK, kies nomoj ne jam aperis en la Kongresa Libro, estas:

**Magnetofona Servo**: s-ro **R. Wagner**, n-ro 1478
**La Germana Eksprese**: s-ro **J. Schiffer**, n-ro 532
s-ro **W. Hauke**, n-ro 1797
**Konversaciaj Rondoj**: s-ro **W. Posthuma**, n-ro 870
s-ino **L. Palczewska**, n-ro 325
**Fotoservo**: s-ro **W. Wiegand**, n-ro 699
s-ro **L. Nikov**, n-ro 1989
**Gazetara Servo**: s-ino **E. Bormann**, n-ro 155

Multajn dankojn al ĉiuj niaj helpantoj, kiuj kutime laboras volontule kaj senpage! Ni publikigos la nomojn de aliaj funkciuloj laŭbezone.

Partoprenantoj en la Cseh-kurso por komencantoj aŭ la Cseh-seminario estos sub la gvido de s-ro **S. Keller**, n-ro 1215, kiun asistos s-ino **M. van der Horst-Kolińska**, n-ro 266.

### program-ŝanĝoj

Principe ni intencas ŝanĝi la programon kiom eble plej malmulte. Tamen, ni foje ne povas eviti tion; por mildigi la ĝenon, ni sciigos en la kongresejo la ŝanĝojn, espereble per surekrana projekciado de la tagprogramo, ĉe kiu ni indikos la ŝanĝojn ruĝe.

Jam nun ni petas vin noti jenajn modifojn:

Lunde: **"Agado ĉe UN"** forfalas
Marde: **"Agado ĉe UN"** okazos de 9.00 h ĝis 10.00 h en salono Pickel.

Merkrede: la **Filozofia Simpozio** daŭros de 16.00 h ĝis 18.00 h en salono Pickel.

Vendrede: estos kunsido de **Monda Turismo** en salono Pickel de 9.00 h ĝis 11.00 h.

**Raportoj pri la kongresoj, kiuj okazis antaŭ la UK, aperos en la lunda eldono de STROBILO.**

### ESPERANTOLOGIA KONFERENCO

**"Pasinteco kaj estonteco en la evoluo de la lingvo Esperanto"**
Sub tiu ĉi ĝenerala temo okazos la Oka Esperantologia Konferenco de la 9a ĝis 13a horo merkredon, la 7an de aŭgusto en salono Grabowski.
Organizas la konferencon la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo kaj prezidas d-ro Humphrey Tonkin, la direktoro de la Centro.

La programo konsistos el jenaj eroj:
D-ro Detlev **Blanke** (GDR): "Kio estas planlingvo?"
D-ro Werner **Bormann** (FRG): "Esperanto-kulturo kaj fremdaj vortoj"
Inĝ. Felix **Garcia Blazquez** (Venezuelo): "Transitiveco de la verbo aŭ transitiveco de la ago"
Prof. Istvan **Szerdahelyi** (Hungario): "La plej novaj rezultoj de la analizo de Universala Vortaro de Zamenhof"
D-ro Victor **Sadler** (Nederlando/Britio) kaj d-ro Klaus **Schubert** (Nederlando/FRG): "Aktuala stato de la projekto Distribua Lingva Tradukado"

La tri unuaj eroj okupos la unuan parton de la konferenco, de la 9a ĝis proks. 11a h, la tri aliaj parolantoj okupos la duan parton. Estos okazo por demandoj kaj diskutoj.

## ADRESARO - SUPLEMENTO

Ni multe bedaŭras, ke komputila kaprico ellasis parton de la adresaro en la Kongresa Libro. Ni presas ĉi-sube la mankantajn adresojn, kune kun la suplementa adresaro. Pliaj suplementoj aperos en postaj numeroj de „Strobilo".

536 lins-f **Lins, D-ro Ulrich,** Gemarkenstr. 150, D-5000 Köln 80, FR Germanujo

537 scad-g **Schaale, S-ino Adelheid,** Wald-Strasse 23, D-6113 Babenhausen 1, FR Germanujo

538 thkl-n **Kleemann, S-ro Thomas,** Im Kirchspitzen 12 a, D-7552 Durmersheim, FR Germanujo

539 abag-e **Bagger, S-ino Anna,** Anemonevej 22, DK-4000 Roskilde, Danlando

540 altg-c **Tur Garcia, S-ro Alfonso,** C. Mineria 2, 5°-3a, E-08004 Barcelona, Hispanujo

541 atur-x **Tur Thomas, S-ro Alfonso,** C. Mineria 2, 5°-3a, E-08004 Barcelona, Hispanujo

542 jgar-u **Garcia Fernandez,** S-ino Josefina, C. Mineria 2, 5°-3a, E-08004 Barcelona, Hispanujo

543 pimo-v **Moa Banga, S-ro Pio,** Gran Vía 190 - 9° C, Vigo (Pontevedra), Hispanujo

544 joda-r **Dawson, F-ino Joan,** 79 Bishop Ken Road, Harrow Weald, Harrow Middx., Britujo HA3 7HP

545 szen-b **Szénási, D-ro Sándor,** Foglár u. 6, H-3301 Eger, Hungarujo

546 bono-b **Bonomi, S-ro Paolo,** Via Butturini 8, I-37126 Verona, Italujo

547 chri-i **Chiriotti, S-ino Maria,** Via Lauro Rossi 43/6, I-10155 Torino, Italujo

548 lbon-v **Bonomi, S-ino Luisa,** Via Butturini 8, I-37126 Verona, Italujo

549 rcct-y **Roccati, F-ino Luigina,** Via Lauro Rossi 43/6, I-10155 Torino, Italujo

550 ropo-n **Polettini, S-ino Rosalba,** Piazza Arsenale 5 A, I-37030 Verona, Italujo

551 clgs-q **Schulze, S-ino Catherine L.,** 410 Darrell Rd., Hillsborough CA 94010, Usono

552 wmhs-v **Schulze, S-ro William H.,** 410 Darrell Rd., Hillsborough CA 94010, Usono

553 asol-c **Solarz, S-ro Alberto,** Av. Roraima 5, San Bernardino, Caracas 1011, Venezuelo

554 anen-v **Enzlin, F-ino Anny,** Kard. Mercierlei 34, B-2600 Antwerpen, Belgujo

555 humt-c **Humet, S-ro Alexandre,** Terliststr. 12, B-2018 Antwerpen, Belgujo

556 itty-c **Tytgat, F-ino Ite,** Terliststr. 12, B-2018 Antwerpen, Belgujo

557 dter-d **Terziev, S-ro Dimitr,** ul. Milin Kamâk 58, BG-1421 Sofia, Bulgarujo

558 glbu-s **Budinova,** S-ino Galabinka Ljubenova, ul. Stojan Popov 37, BG-4600 Velingrad, Bulgarujo

559 fhof-d **Hofmann, S-ro Friedrich,** Dickensstr. 9, D-8000 München 60, FR Germanujo

560 fvog-i **Vogelmann, Franziska,** Steinbacher Str. 16, D-7151 Auenwald 1, FR Germanujo

561 gvog-g **Vogelmann, S-ro Gunter,** Steinbacher Str. 16, D-7151 Auenwald 1, FR Germanujo

562 joac-t **Grotjahn, S-ro Joachim,** Buchhaŭserstr. 64, D-2800 Bremen 61, FR Germanujo

563 mwst-o **Westermayer, S-ro Manfred,** Steinmattenstr. 4, D-7803 Gundelfingen-Wildtal, FR Germanujo

564 pern-s **Perény, Inĝ. Michael,** Jägerstr. 3, D-5245 Mudersbach, FR Germanujo

565 savo-d **Vogelmann, Sandra,** Steinbacherstr. 16, D-7151 Auenwald, FR Germanujo

566 sbgr-t **Bauer-Grosser, S-ino Sigrud,** Am Angerl 52, D-8119 Grossweil, FR Germanujo

567 sivo-f **Vogelmann, Silke,** Steinbacher Str. 16, D-7151 Auenwald 1, FR Germanujo

568 bdor-p **Torbell, S-ino Bodil,** Hanneruphus, Viaduktvej 7-28, DK-7000 Fredericia, Danlando

569 ango-i **Montesinos de Gomis,** S-ino Ana, Calle Padre Damian 44, 6° izda, E-28036 Madrid 16, Hispanujo

570 faon-k **Otaola Faón, S-ro Luís de,** Amadeo Deprit 5-7°-C, E-48006 Bilbao, Hispanujo

571 yvrn-b **Vierne, D-ino Yvette,** 5 rue Docteur Roux, F-34000 Montpellier, Francujo

572 spsa-o **Sarafian, S-ro Spiros,** Rodu 23, Athina 104 46, Greklando

900 hhen-z **Henry, S-ro Hugues,** 9 Résidence Rochebrune, F-91220 Bretigny, Francujo

901 jgnn-o **Gonin, S-ino Jacqueline,** 20 ave. de Saint-Exupéry, F-69100 Villeurbanne, Francujo

902 jhen-v **Hénin, S-ro Jean,** Beauregard Route de Montcayroux, F-48500 La Canourgue, Francujo

903 lgil-o **Giloteaux, S-ro Lucien,** 3 allée Béranger, F-59170 Croix, Francujo

904 llgl-h **Giloteaux, S-ino Lilli,** 3 allée Béranger, F-59170 Croix, Francujo

905 mjbe-o **Berger, S-ino Marie-Josèphe,** 29 rue de la Pradelle, F-63000 Clermont-Ferrand, Francujo

906 mtll-n **Lloancy, S-ino Marie-Thérèse,** 5 rue Léonard Constant, F-64000 Pau, Francujo

907 rbll-f **Lloancy, S-ro Roberto,** 5 rue Léonard Constant, F-64000 Pau, Francujo

908 rcor-m **Correy, F-ino Renée,** 10 rue des Courtils, F-25000 Besançon, Francujo

909 rmot-y **Motto, S-ro Roger,** Les Magnolias, 27 ter, ave. Moulin Notre-Dame, F-84000 Avignon, Francujo

910 aang-h **Angeletti, D-ro Alessandro,** Via Repubblica 13, I-07014 Ozieri, Italujo

911 cafa-n **Faccioli Gorini, S-ino Carla,** Via Talvera 2/B, I-39100 Bolzano, Italujo

912 catt-s **Chistè Cattani, S-ino Rosaria,** via Zanella 12, I-38100 Trento, Italujo

913 gial-y **Allanconi, S-ro Giordano,** Via della Libertá 30, I-26010 Ripalta Cremasca, Italujo

914 gist-q **Stocchiero, S-ro Giuseppe,** Via A.Rossi 124, I-36100 Vicenza, Italujo

915 gmri-l **Giordano, S-ro Mario,** Rione S. Marco 3/3, I-38040 Ravina (Trento), Italujo

916 ilde-i **Barbetti, S-ino Ildegarda,** Via Tartarotti 3, I-38068 Rovereto (TN), Italujo

917 lnon-l **Nones, S-ino Laura,** Via Perini 119, I-38100 Trento, Italujo

918 mcri-d **Coraiola, S-ino Maria,** Tavernaro 15, I-38050 Tavernaro (Trento), Italujo

919 veve-j **Venchi, S-ino Vera,** Via G Murat 8, I-34123 Trieste, Italujo

920 wltr-h **Checchi, S-ro Walter,** Via Vespucci 2, I-40131 Bologna, Italujo

921 hlun-b **Lundholm, S-ro Hermann,** Hlidarveg 45, IS-200 Kópavegur, Islando

922 jegu-n **Gudjónsson, S-ro Jón Emil,** Eskihlíd 6, IS-105 Reykjavík, Islando

923 jhjo-w **Jónsson, S-ro Jón Hafsteinn,** Thórunnarstræti 128, IS-602 Akureyri, Islando

924 stsg-y **Sigurdsson, S-ro Stefán,** Vesturbrún 14, IS-104 Reykjavík, Islando

925 yonm-r **Maeda, S-ro Yonemi,** Komatubara-roku-tyôme 1-6, Wakayama-si, 640 Japanujo

926 dsgi-r **Gim Dong-sun, S-ro,** Yonbulam, Samsongsan, Suseong-dong, Anyang-si, Gyeonggi-do-171, Korea Resp.

927 igip-a **Lee, S-ro Jip Choon,** Dae Bang Cheon Chol Apt. B-dong 503, Sinkil-7-dong, 1343, Seoul, Yeung-deung-po-ku-150, Korea Resp.

928 shgi-u **Gim Sin-hong, S-ro,** 138-1, Gjongan 5 Li, Guangju-up, Guangju-gun, Kjonggi-do-130-10, Korea Resp.

929 cbss-y **Bossong-Singer, S-ino C.,** Floraplein 23, NL-5644 JS Eindhoven, Nederlando

930 cdui-i **Duivenvoorden-Kors, S-ino C.,** Kamerlingh Onnesstr. 40, NL-2014 EM Haarlem, Nederlando

931 fdbp-r **Bos-de Pagter, S-ino F.,** Fockema Andreastraat 1, NL-5652 PH Eindhoven, Nederlando

932 jbos-a **Bos, S-ro J.,** Fockema Andreastr. 1, NL-5652 PH Eindhoven, Nederlando

933 jcvt-q **Tinteren, F-ino J.C.v.,** Dorresteinseweg 49 flat 508, NL-3817 GB Amersfoort, Nederlando

934 jjmz-b **Zentveld, S-ino Johanna J. M.,** Nassauplein 15, NL-1815 GN Alkmaar, Nederlando

935 johs-p **Stroomer, S-ino Johanna,** Nassauplein 14, NL-1815 GN Alkmaar, Nederlando

936 jvsg-k **Smit-Groeneveld,** S-ino Johanna V., Robert Kochlaan 684, NL-2035 BW Haarlem, Nederlando

937 mgsl-y **Schoutens-van Lammeren,** S-ino M.G., Heemsteedse Dreef 121, NL-2101 KB Heemstede, Nederlando

938 pjra-q **Ransijn, S-ro P.J.,** Postbus 1073, NL-1500 AB Zaandam, Nederlando

939 rvdo-o **Outenaar,** S-ro Rengert van den, Robert Kochlaan 684, NL-2035 BW Haarlem, Nederlando

940 stpo-w **Pothuizen, S-ino Stefania,** de Bazelstraat 32, NL-1222 RJ Hilversum, Nederlando

941 stro-o **Stroomer, S-ino T.,** Nassauplein 14, NL-1815 GN Alkmaar, Nederlando

942 terw-r **Terwisga, S-ro P.H. van,** Dorpsstr. 33, NL-8899 AB Vlieland, Nederlando

943 tvmb-n **Meulen-Bulthuis,** S-ino Titia van der, Vestpoort 39, NL-2611 ME Delft, Nederlando

944 tyty-r **Tyblewski, D-ro Tyburcjusz,** Bartka Zwycięzcy 11 m 1, PL-58-500 Jelenia Góra, Pollando

945 amyn-w **Nilsson, S-ino Amy,** Kristinehovsg. 23,8/349, S-117 29 Stockholm, Svedujo

946 baka-v **Karlsson, S-ino Barbro,** Järnvägsgatan 5A, S-453 00 Lysekil, Svedujo

947 bvig-o **Viggen, S-ro Birger,** Kvarnplan 1, 5 tr, S-175 41 Järfälla, Svedujo

948 edsn-n **Edsenius, S-ro Erik,** Vilhelmsgatan 2, S-382 00 Nybro, Svedujo

949 eira-p **Rasmussen, S-ro Einar,** Surbrunnsgat. 41, III, S-113 24 Stockholm, Svedujo

950 gols-f **Olsson, S-ro Gunnar,** Slingv. 12, S-541 40 Skövde, Svedujo

951 inez-x **Lagerkrantz, S-ino Inez,** PL 4597 Stennäset, S-791 91 Falun, Svedujo

952 ngrk-f **Eriksson, S-ro Ingvar,** Midgårdsgatan 4, S-521 00 Falköping, Svedujo

953 jrgv-v **Jegorovas, S-ro Paul K.,** ab/k 167, SU-233000 Kaunas C, Soveta Unio

954 dora-z **Gertsikov, S-ino Dora,** 1449-48th Avenue # 4, San Francisco CA 94122, Usono

955 erva-y **Vathis, S-ino Erika S.,** E 1529-37th Ave., Spokane WA 99203, Usono

956 erwe-a **Weiner, S-ino Elsie R.,** 17050 Northrup Way #19, Bellevue WA 98008, Usono

957 grge-i **Gertsikov, S-ro Grigory,** 1449 - 48th Ave. #4, San Francisco CA 94122, Usono

958 hiwn-c **Weiner, D-ro Harry I.,** 17050 Northrup Way, 19, Bellevue WA 98008, Usono

959 kenn-s **Kennedy, Maya,** 88 Estates Dr. # 7, Danville CA 94526, Usono

960 davo-h **Grgat, S-ro Davor,** Pajičeva 21/1 Gripe-Lokve, YU-58000 Split, Jugoslavio

961 erar-x **Arva, S-ro Ernesto,** Ul. Djure Cvejiĉa 16, YU-26300 Vrŝac, Jugoslavio

962 mgal-s **Almaŝi, S-ino Magda,** Nicole Tesle 11/18, YU-24300 Bačka Topola, Jugoslavio

963 mili-j **Lipiĉar, S-ino Mira,** Sergeja Maŝere 9, YU-66000 Koper, Jugoslavio

964 milm-p **Marković, S-ro Milan,** Rajićeva 22/II, YU-11000 Beograd, Jugoslavio

965 ntun-r **Ŝimuniĉ, Prof. Antun,** Džemala Bijedića 7/I, YU-54000 Osijek, Jugoslavio

966 rojc-t **Rojc, Andrej,** Strossmayerjeva 8, YU-62000 Maribor, Jugoslavio

967 zdro-w **Rojc, S-ino Zdenka,** Strosmajerova 8, YU-62000 Maribor, Jugoslavio

968 jbac-g **Bachrich, Prof. Juan Eduardo,** Apto. 3833, Caracas 1010A, Venezuelo

969 lbac-c **Bachrich, Liliana M.,** Apartado 3833, Caracas 1010 (A), Venezuelo

970 mbac-a **Bachrich, S-ino Maria,** Apartado 3833, Caracas 1010 (A), Venezuelo

971 hrma-c **Manolov, S-ro Ĥristo,** ul. L. Karavelov 22, BG-5180 Polski Trambeŝ, Bulgarujo

998 mage-v **Gerrier, S-ino Marie Antoinette,** 179 rue Ordener, F-75018 Paris, Francujo

999 mcor-w **Cornavin, S-ro Marcel,** 6 allée de Chamrousse, Corenc-Montfleury, F-38700 La Tronche, Francujo

1789 anmi-o **Milatová, F-ino Anna,** Husova 304, CS-739 61 Třinec, Ĉeĥoslovakio

1790 aeet-s **Meyer, Annegret,** Josef-Weigl-Str. 6, D-8024 Deisenhofen, FR Germanujo

1791 hepi-p **Pitten, S-ino Helene,** Keltenring 44, D-5350 Euskirchen, FR Germanujo

1792 hrbr-n **Hörberg, S-ro Josef,** Marienstr. 2, D-8570 Pegnitz, FR Germanujo

1793 mhlg-w **Hilger, S-ino Margarete,** Wallauerstr. 20, D-6238 Hofheim-Langenhain, FR Germanujo

1794 refr-q **Reisel, S-ino Franziska,** Spessartweg 41, D-6236 Eschborn, FR Germanujo

1795 rure-l **Reisel, S-ro Rudolf,** Spessartweg 41, D-6236 Eschborn, FR Germanujo

1796 umai-z **Maier, S-ro Utho,** Dewanger Str. 19, D-7080 Aalen, FR Germanujo

1797 whau-c **Hauke, S-ro Wolfgang,** Sommerhalde 59, D-7737 Bad Dürrheim 3, FR Germanujo

1798 wdra-u **Widera, S-ino Stefania,** ul. Szczecińska 31 m 1, PL-41-506 Chorzów, Pollando

1799 adka-o **Adamova, Karamfilka,** Lajaŝ Koŝut 10, vh 5, BG-1606 Sofia, Bulgarujo

1800 glkt-n **Kostova-Toteva, S-ino Galja,** ul.Iŝkar bl.3 vh. III ap. 65, BG-8600 Jambol, Bulgarujo

1801 gdeu-e **Deutsch, S-ro Gernot,** Fritz-Frey-Str. 5, D-6900 Heidelberg, FR Germanujo

1802 aalb-o **Albault, D-ro André,** 21 rue de Verfeil, F-31200 Toulouse, Francujo

1803 akis-p **Kiss, S-ino Anna,** 15 rue Jean Dandin, F-75015 Paris, Francujo

1804 balb-m **Albault, S-ino Berthe,** 21 rue de Verfeil, F-31200 Toulouse, Francujo

1805 dedo-p **Deiber, S-ino Dominique,** 3 Résidence Manet, Apt. 2, F-62230 Outreau, Francujo

1806 sled-p **Ledan, S-ino Simone,** CES Champbenoist, Ave. de Voulzie, F-77160 Provins, Francujo

1807 saph-k **Phillips, S-ino Sally,** 18 Crooked Bridge Road, Stafford, Britujo ST16 3NE

1808 diam-z **Diamantis, S-ro Adamantios,** Mitimnis 58, Athina 111 52, Greklando

1809 elvo-y **Vojatzaki, S-ino Elefteria,** Tsokopoulou 2, Athina 152 37, Greklando

1810 mapo-n **Pontika, S-ino Maria,** Kalifrona 46, Kipseli, Athina 113 64, Greklando

1811 patm-b **Patmiu, S-ino Evdokia,** Rodon 15, Drosia Atikis 145 65, Greklando

1812 stza-a **Zafiriu, S-ro Stelios,** Ippokratus 6, Athina 106 79, Greklando

1813 bcht-k **Becht, S-ino Erika,** Fö u. 92, H-1027 Budapest, Hungarujo

1814 afrz-l **Afrouz, S-ino Novin,** Piazzale Dateo 6, I-20129 Milano, Italujo

1815 suca-l **Castel, S-ino Susanna,** p/a de Giorgis, Viale Giustiniano 159/21, I-00145 Roma, Italujo

1816 cobi-z **Pothuizen, F-ino J.J.E.,** Kerkhoflaan 9, NL-7913 FF Hollandsveld, Nederlando

1817 roff-u **Roff, S-ro Derek,** Nwe Binnenweg 197 B, NL-3021 GA Rotterdam, Nederlando

1818 freh-d **Helmuth, S-ro Francis E.,** P.O. Box 918, Julian CA 92036, Usono

1819 glmh-n **Helmuth, S-ino Gloria Macias,** P.O. Box 918, Julian CA 92036, Usono

1820 iusm-l **Manson, D-ro Julius J.,** 14 Stuyvesant Oval, New York NY 10009, Usono

1821 kitt-e **Kittredge, S-ro Stuart E.,** 59 Dalewood Road, Newington CT 06111, Usono

1822 lizm-n **Manson, S-ino Elizabeth,** 14 Stuyvesant Oval, New York NY 10009, Usono

1823 mpul-p **Pulley, Mary,** PO Box 1031 - FDR Station, New York NY 10022, Usono

1824 rucu-r **Culbert, S-ino Ruth,** 14833 - 39th Ave. NE, Seattle WA 98155, Usono

1825 sscl-o **Culbert, D-ro Sidney S.,** 14833 - 39th NE, Seattle WA 98155, Usono

1826 jsta-t **Starck, S-ro José,** Bld. des Guérets 46, B-4880 Spa, Belgujo

1827 rsta-d **Stanĉeva, S-ino Rajna,** Poŝtokesto 509, BG-9701 Ŝumen, Bulgarujo

1828 dclu-l **Lumsden, S-ino Diana Claire,** Rudolfstr. 19, D-4500 Osnabrück, FR Germanujo

1829 evat-b **Tiensuu, S-ino Eva Tony,** Hyrdevangen 46, 3, DK-2400 København NV, Danlando

1830 emld-m **Ludwig, S-ro Edmond,** 46 route de la Schlucht/Stosswihr, F-68140 Munster, Francujo

1831 gifa-h **Faugiere, S-ino Gisèle,** 36 quai Auguste Prévost, F-77500 Chelles, Francujo

1832 gubl-k **Blary, S-ro Gustave,** Les Alpilles Le Paradou, F-13520 Maussane-Les-Alpilles, Francujo

1833 pifa-p **Faugiere, S-ro Pierre,** 36 quai Auguste Prévost, F-77500 Chelles, Francujo

1834 djhu-g **Hughes, S-ro Donald Jefferson,** 12 Woodford Close, Caversham, Reading, Britujo RG4 7HN

1835 jhnc-o **Roberts, S-ro John C.,** 19 White Horses Way, Littlehampton, Britujo BN17 6NH

1836 jhwo-w **Worley, S-ino Judith Helen,** Bidbury House, Bidbury Lane, Havant, Britujo PO9 3JG

1837 worl-k **Worley, S-ro John Albert,** Bidbury House, Bidbury Lane, Havant, Britujo PO9 3JG

1838 clrc-a **Clerici, S-ro Ranieri,** Via Conte Verde 66, I-00185 Roma, Italujo

1839 dabo-j **Bottegoni, S-ino Daniela,** Via Rismondo 1, I-60123 Ancona, Italujo

1840 ilcl-d **Clerici, S-ino Isabella Léon,** Via Conte Verde 66, I-00185 Roma, Italujo

1841 cark-t **Ĉarkowsky, S-ro Marian,** ul. Lọkowa 3 m 25, PL-45-715 Opole, Pollando

1842 mdur-v **Durys, S-ino Maria,** ul. Lọkowa 3 m 25, PL-45-715 Opole, Pollando

1843 moro-p **Moro III, S-ro Bradio V.,** General English Section, Huzina (Fu-jen) Universitato, RC-242 Sin-chng, Tai-pak Distrikto, Ĉinio (Tajvano)

1844 bmki-x **Kim-Lindblom, S-ino Boo Mee,** Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedujo

1845 romc-h **McCoy, S-ro Roy,** 371 Harvard St., Cambridge MA 02138, Usono

1846 jmve-j **Verdière, S-ro Jean-Marie,** Bld. Piercot 21 b / 5e, B-4000 Liège, Belgujo

1847 tsir-k **Tsirimokos, S-ro Angelos,** Rue A. Gautier 7, B-1040 Bruxelles, Belgujo

1848 bijl-y **Bijleveld, S-ino May,** Rua Sta. Alexandrina 481, ap. 606, BR-20261 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo

1849 clag-w **Günkel, S-ro Claus,** Moosweg 36, D-5180 Eschweiler, FR Germanujo

1850 elhe-a **Hellmuth, S-ino Elise,** Nelkenstr. 3, D-7024 Filderstadt 4, FR Germanujo

1851 gaby-f **Matthees, F-ino Gaby,** Ekherstr. 6, 1 b, D-8904 Friedberg, FR Germanujo

1852 kmmr-e **Kemmer, S-ro Ulf,** Cäcilienstr.32, D-5300 Bonn 3, FR Germanujo

1853 kohr-s **Köhrmann, S-ro Herbert,** Lockfinke 16, D-5600 Wuppertal 1, FR Germanujo

1854 mbai-w **Baier, S-ino Maria,** Friedrich-Ebert-Ring 16, D-8700 Würzburg, FR Germanujo

1855 ptrr-f **Roether, S-ro Peter,** Steinbach, Berliner Str. 9, D-6120 Michelstadt, FR Germanujo

1856 shfr-f **Schäffer, S-ro Martin,** Falkenstr. 32, D-4133 Neukirchen Vluyn, FR Germanujo

1857 stbu-w **Städele, S-ro Rudolf,** Butschbacher Str. 46, D-7602 Oberkirch, FR Germanujo

1858 thpu-a **Pusch, S-ro Thomas,** Am Schwertberge 23, D-2845 Damme 1, FR Germanujo

1859 weid-m **Weide, S-ro Peter,** Nordalbingerweg 63, D-2000 Hamburg 61, FR Germanujo

1860 rori-j **Roca Ricart, S-ro Ramón,** C. Rosendo Arús 8, bajos, Hospitalet de Llobregat (Barcelona), Hispanujo

1861 ishe-x **Hénin, F-ino Isabelle,** Beauregard, Route de Montcayroux, F-48500 La Canourgue, Francujo

1862 rbas-o **Bastong, S-ro René,** 84 bis, rue Henri Prou, F-78340 Les Clayes-sous-Bois, Francujo

1863 vaqu-n **Querville, S-ino Valentine,** 122 rue de l'Amiral Querville, F-41000 Blois, Francujo

1864 wgil-s **Gilbert, S-ro W.,** 30 rue Croix Montoire, F-37100 Tours, Francujo

1865 cdcs-e **Da Costa, S-ino Carla,** I-55050 S. Lorenzo a Vaccoli, Italujo

1866 gmls-l **Mulas, F-ino Giuseppina,** via Veneto 67, I-08100 Nuoro, Italujo

1867 pldc-e **Da Costa, S-ro Pier Luigi,** I-55050 S. Lorenzo a Vaccoli, Italujo

1868 elza-a **Zalcman, S-ro Eldad,** 8 Naomistr., IL-47 208 Ramat-Haŝaron, Israelo

1869 nisu-x **Nisiumi, Prof. Tarô,** Kitakoiwaroku-Tyôme 31-19, Edogawa-ku, Tôkyô, 133 Japanujo

1870 rowy-n **MacGill, Rowena,** Oaza, Fuzimi 345-106, Kawagoe-si, Saitama-ken, 356 Japanujo

1871 japb-g **Pilger-Bugaj, S-ino Janina,** Leekerhoek 26, NL-8223 ZS Lelystad, Nederlando

1872 jexm-l **Exmann, S-ro Jan,** Raamstraat 38, NL-7411 CW Deventer, Nederlando

1873 wpil-r **Pilger, S-ro Wouter,** Leekerhoek 26, NL-8223 ZS Lelystad, Nederlando

1874 jpar-t **Parzyszek, Jaroslaw,** Nowe Kawkowo 25, PL-11-043 Wolowno, Pollando

1875 jkkl-y **Jaakkola, S-ino Helvi,** Kuunsäde 6 C 14, SF-02210 Espoo 21, Finnlando

1876 lbrg-s **Bergman, S-ino Liisa,** Katriinantie, SF-01760 Vantaa 76, Finnlando

1877 lini-d **Nokka, F-ino Liisa,** Hämeenkatu 14 B 28, SF-20500 Turku 50, Finnlando

1878 nisa-t **Sarras, S-ro Niilo,** Sirkkalank. 16 B 9, SF-20500 Turku 50, Finnlando

1879 vmal-i **Mäki-Luopa, Dipl.inĝ.Veikko,** Paasitie 20 A, SF-00830 Helsinki, Finnlando

1880 joep-q **Petta, S-ro Joe,** P.O. Box 955, Rio Hondo TX 78583, Usono

1881 syla-p **Auclair, S-ro Sylvain,** 10605 Curotte Ave, Montréal, Que., Kanado H2C 2Z1

1882 dosw-p **Swierstok, S-ino Dorota,** p/a Pachter, Pf 300109, D-7480 Sigmaringen 3, FR Germanujo

1883 edsc-q **Schuster, S-ino Edith,** Oberdorf 26, D-5305 Alfter 4, FR Germanujo

1884 ende-k **Ender, S-ro Ulrich,** Clemensstr. 76, D-8000 München 40, FR Germanujo

1885 eshp-c **Haupenthal, F-ino Esther,** Schulstr. 30, D-6601 Scheidt, FR Germanujo

1886 ihoh-n **Höhn, S-ino Irmgard,** Wiesenstr. 19, D-8580 Bayreuth, FR Germanujo

1887 kolo-r **Locher, S-ro Konrad,** Waagstr. 12, D-7981 Fronhofen 1, FR Germanujo

1888 ktni-y **Nissen, S-ro Kurt Teodor,** Apenraderstr. 82, D-2390 Flensburg, FR Germanujo

1889 vice-v **Cerdá Aguilar, S-ro Vicente,** Nelkenstr. 3, D-7024 Filderstadt 4, FR Germanujo

1890 wisr-u **Wieser, S-ro Herbert,** Dietersheimer Str. 22, D-8000 München 40, FR Germanujo

1891 croc-u **Roca Ricart, S-ino Carmina,** Rosendo Arús 8, Hospitalet de Llobregat, Hispanujo

1892 rios-p **Rios Centelles, S-ino Ma. Rosa,** Rosendo Arús 8, Hospitalet de Llobregat, Hispanujo

1893 rrmo-q **Roca Rios, S-ino Montserrat,** Rosendo Arús 8, Hospitalet de Llobregat, Hispanujo

1894 henn-y **Hénin, Brigitte,** Beauregard, Route de Montcayroux, F-48500 La Canourgue, Francujo

1895 jbas-e **Bastong, S-ro Jérôme,** 84 bis, rue Henri Prou, F-78340 Les Clayes sous Bois, Francujo

1896 mbas-y **Bastong, S-ino Michèle,** 84 bis, rue Henri Prou, F-78340 Les Clayes-sous-Bois, Francujo

1897 tora-t **Tora, S-ino Annick,** F-11440 Peyriac de Mer, Francujo

1898 crml-j **Angeletti, Carmela,** via Repubblica 13, I-07014 Ozieri, Italujo

1899 eang-z **Angeletti, Eugenia,** via Repubblica 13, I-07014 Ozieri, Italujo

1900 encu-m **Cuoghi, D-ro Enzo,** viale Gramsci 42, I-42049 Sassuolo, Italujo

1901 fboz-z **Bozzini, S-ino Fiorenza,** via Rovereto 14, I-37126 Verona, Italujo

1902 flni-g **Nicolella, Flavia,** via Veneto 15, I-60123 Ancona, Italujo

1903 gili-v **Licciardello, S-ino Giovanna,** Largo A. Missiroli 13, I-00151 Roma, Italujo

1904 mlps-m **Pane Seu, Maria Laura,** via Grixoni 17, I-07014 Ozieri, Italujo

1905 pgse-b **Seu, S-ro Pietro Giovanni,** via Grixoni 17, I-07014 Ozieri, Italujo

1906 akmi-x **Mijamoto, Akiko,** p/a Teatro Vesperruĝo, Fujima 345-106, Kawagoe, Saitama, 356 Japanujo

1907 asda-x **Asada, S-ino Kazuko,** Ziyu-Gakuen Kurati-ryo, Miyayama 4-21-2, Toyonaka, Osaka, 560 Japanujo

1908 nsum-z **Nisiumi, Tieko,** 6-31-19 Kita-Koiwa, Edogawa-ku, Tôkyô, 133 Japanujo

1909 vtim-c **Timiş, S-ro Vasile,** Str. Aleea Bistra 1, Bloc E 1, R-77314 Bucureşti, Rumanujo

1910 arus-y **Rusko, S-ino Anna,** Nummi, SF-21270 Nousiainen, Finnlando

1911 hiru-n **Rusi, S-ino Hillevi,** SF-21590 Karuna, Finnlando

1912 hjuv-t **Juvani, S-ino Helli,** Brahenkatu 9 A, SF-20110 Turku 11, Finnlando

*(dua suplemento aperos en la lunda eldono)*

# LA STROBILO

KONGRESA KURIERO DE L' 70a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN AUGSBURG 1985

sub la aŭspicio de MONATO internacia magazino sendependa, Antwerpen/Augsburg

*Internacia redakcio sub gvido de Stefan Maul, Thomas Bormann kaj Paul Peeraerts*


N-ro 2
lundo, 5 aŭgusto


## SOLENA INAŬGURO EN TRE DECA KAJ AGRABLA ETOSO

### Pli ol 2300 UK-anoj kaj gastoj ĝuis varian programon

**En ĉeesto de multaj gastoj - preskaŭ mankis sidlokoj en la sporthalo - okazis la solena inaŭguro de la 70a UK. Diplomataj reprezentantoj de pluraj landoj salutis la kongresanojn, parte en la internacia lingvo. Interalie la usona reprezentanto alparolis la aŭskultantaron en neriproĉinda Esperanto. La ambasadoro de Cina Popola Respubliko en sia parolado, por kiu li ricevis fortan aplaŭdon, emfazis la apartan gravecon de internaciaj kontaktoj por lia lando kaj la tiurilatan signifon de la venonta UK en Pekino.**

La ĉefurbestro de Augsburg, Hans Breuer, per tre afablaj vortoj bonvenigis la kongreson kaj certigis al ĝi siajn subtenon kaj simpation. Aparte impresis lin, ke li "estis la sola, kiu bezonis interpretiston". Tiajn problemojn ne havis la partoprenantoj de la infana kongreseto, kiuj poste salutis siajn "gepatrojn".
Profesoro Humphrey Tonkin tre lerte eksplikis la kongresan temon, ĝiajn signifon por Esperanto, por Augsburg kaj por la tuta mondo, kaj per tio donis bonan fundamenton por la dumkongresaj diskutoj. Poste mag. William Auld prezentis pli detalajn aspektojn de la kongresa temo "Antikvo kaj Moderno - kion ŝanĝi, kion konservi?"
Orkestro kaj koruso faris siajn kontribuojn al la bonega etoso per prezentado de pacokanto kaj "subteno de la komuna kantado de La Espero".



*En agrabla kaj solena etoso evoluis la inaŭguro. Nia bildo montras la podion kun la estraro de UEA dum kantado de "La Espero".*

**Salutintaj diplomatoj** dum la solena inaŭguro:
**Aŭstrio:** s-ino Wiedermann, vickonsulo
**Burkina Faso:** prof. Walter Heubl, ĝenerala konsulo
**Cina PR:** Lia Ekscelenco Guo Fen-min, ambasadoro
**Danlando:** s-ro Ernst Hansen, konsulo
**Italio:** s-ro Luciano Koch, ĝenerala konsulo
**Usono:** s-ro Gregory Lynch, konsulo (salutis en Esperanto)

Krome salutis d-ro Dieter Rogalla, membro de la Eŭropa Parlamento, kaj s-ro Tom Arbo Høeg en la nomo de la registaro de Norvegio. Ĉeestis en la Inaŭguro ankaŭ d-ro Attila Király, unua sekretario kaj kultura ataŝeo de la ambasado de Hungario, kaj s-ro Hong Shannan, unua sekretario de la ambasado de Cina PR.

============================

EKSKURSONTOJ ATENTU!

**La ekskursa servo informas:**

La tuttagaj ekskursoj **A1, A2, A3** kaj **A4** komenciĝos je la **8a horo, ĵaŭde.**
La duontagaj ekskursoj al **Munkeno** komenciĝos je la **12a horo.**
La urba rondveturo tra **Augsburg** komenciĝos je la **14a horo.**
La duontaga ekskurso **B4 al Pfaffenhofen** komenciĝos **merkrede** je la **12a horo.**

Atentu: ĉiuj busoj forveturas de la placo antaŭ **sporthalo**, kie estis la inaŭguro.
Bonvolu esti akurataj.

---

Telegramo al
**Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo Helsinki:**

Universala Esperanto-Asocio, kunvenante en Augsburg, sendas siajn salutojn al la finna registaro kaj la aliaj subskribintoj de la Fina Akto de Helsinki okaze de ties deka datreveno. La Fina Akto reprezentis signifan paŝon antaŭen en la internacia kunlaboro.
En tiu senco ĝiaj celoj koincidas kun tiuj de la Esperanto-movado, kiu instigas kaj faciligas la kompreniĝon trans landaj kaj lingvaj limoj. Ni esperas, ke tia kompreniĝo vaste pliboniĝos en estontaj jaroj, ĉar ĝi konsistigas la plej bonan fundamenton de daŭra internacia paco.

Grégoire Maertens
Prezidanto
1985-07-31

*

Ni atentigas, ke la Fina Akto estas havebla en Esperanto-traduko ĉe la kongresa libroservo por 1,00 DM (germ. markoj).

---

KRONACH ATENDAS VIN

Al la postkongresa **Internacia Feriosemajno en Kronach** aliĝis ĝis la pasinta vendredo entute 194 personoj el 20 landoj kaj 4 kontinentoj, inter ili 83 viroj kaj 111 inoj. Se vi volas aliĝi al la Feriosemajno, venu laŭeble baldaŭ al la koncerna giĉeto en la kongresejo! Ni faros ĉion eblan; sed ĉar ni en Kronach konkurencos kun la samtempe okazonta festo de "Libera Pafado", la plej granda festo de la regiono, ni devas en ĉiu unuopa kazo kontroli, ĉu loĝejoj estas je nia dispono. Pro tio la giĉetodeĵorantoj kutime ne tuj povas jesi vian tiurilatan demandon, sed eventuale petos vin atendi iom da tempo.
Por aliĝantoj el landoj kun devizaj malfacilaĵoj ni devas trovi patronojn, kiuj transprenas la pagojn de la aliĝkotizoj. En nia malgranda urbo estas multaj favorantoj de nia afero, sed la nombro de financuloj estas ne malelĉerpebla.
Do, se iu ankoraŭ emas aliĝi al la postkongresa feriosemajno kaj eventuale pretas atendi iom da tempo, ĝis ni mem estos ricevintaj jesan signon el Kronach, li aŭ ŝi aliĝu!

Armin Grötzner

---

## AKTUALE

**Vetero:** serena, foje nuba ĉielo kaj preskaŭ ne risko de pluvo.
**Usono:** 132 homoj mortis pro akcidento en la flughaveno de Dallas/Fort Worth en vendredo. Probable orkano kaŭzis ĝin.
**Suda Koreio:** La sudkorea opozicia politikisto Kim Dae Jung depost sabato denove rajtas forlasi sian hejmon. Je ĵaŭdo kaj vendredo okazis la partia kongreso de la opozicia Nova Demokrata Partio de Koreio, kiu intencis oferti al Kim postenon de konsilisto. La registaro minacis aresti lin, se li akceptas tion.
**Francio:** 35 homoj mortis kaj 48 vundiĝis pro kolizio de du trajnoj en la franca urbo Flaujac en sabato; kaŭzo estis malĝusta signalo.
**Usono:** Miloj da homoj memore al la unua atombomba ĵeto en Hiroŝima (6a de aŭgusto 1945) manifestaciis dimanĉon en la usona ĉefurbo Vaŝingtono por la paco en la tuta mondo. Partoprenis la manifestacion ankaŭ japanoj, kiuj transvivis la katastrofon.
**Sovetio:** En gaja kaj nepolitika atmosfero finiĝis la 12a Monda Festivalo de la Junularo kaj Studentaro en Moskvo kun ĉ. 100 000 partoprenantoj.TEJO estis reprezentita de la estraranoj s-ino Elisabeth Schwarzer kaj Maŝa Vanĉurova. La prezidanto de TEJO, s-ro Ian Jackson, ne povis flugi al Moskvo, ĉar la sovetiaj instancoj ne liveris la vizon ĝustatempe.

VIRINA AGADO
**Restas ankoraŭ lokoj en la seminario, merkrede la 7an. Vidu prezentadon en la kongresa libro, paĝo 47.**
**Eblas anonciĝi dum la publika kunsido, kiu okazos rekte antaŭ la seminario.**

Teatro marde!
Bedaŭrinda eraro okazis sur la programfolio pri la Teatra Vespero. Gi nek okazos la 4-an de aŭgusto nek je la 16h30. Fakte ĝi okazos marde la 6-an de aŭgusto je la 20-a horo. Bv. atenti la korekton.

---

**Surprizo dum la balo**
Nepre ne maltrafu la komencon de la balo hodiaŭ vespere! Tiam prezentiĝos al vi surpriza donaco de la kongresurbo. Ni ne volas informi vin jam pri detaloj - tiukaze ja ne plu estus surprizo - sed tiom ni povas diri: estas interesa historia spektaklo! Multan plezuron!

## HARMONIA ETOSO EN FAMILIECA ANTAŬKONGRESO
## 40 partoprenantoj el 12 landoj en Oberkirch

**OBERKIRCH (pck). La loka Esperanto-Grupo kaj la naturamikaj esperantistoj organizis antaŭkongresan feriosemajnon de la 27a de julio ĝis la 2a de aŭgusto en la idilia urbeto Oberkirch en Nigra Arbaro (FRG), kiun partoprenis 40 gesamideanoj el 12 landoj.**



*Gaja rondo de partoprenantoj de la antaŭkongreso en Oberkirch partoprenis ankaŭ lokan feston.*

Dum la interkona vespero Margot Hektor, prezidantino de la Esperanto-Grupo, povis bonvenigi ankaŭ reprezentanton de la urbo, skabenon Seiler, la prezidantinon de la Landa Asocio de "La Naturamikoj", Marlise Kober, kaj la estron de la loka naturamika grupo, Kurt Zureich. En la kadro de tiu vespero skabeno Seiler distingis nome de la ministroprezidanto de Baden-Virtembergo sinjoron **Walter Popeck**, honoran prezidanton de Esperanto-Grupo Oberkirch, per la honor-insigno de la federacia lando kaj substrekis en sia parolado la multajn meritojn, kiujn Poppeck akiris per sia honor-ofica laboro por la Esperanto-movado dum pli ol 50 jaroj.
La organizantoj prezentis al la gastoj el tri kontinentoj varian programon. Kulmino estis tuttaga ekskurso dum bela vetero. Per aŭtobuso oni unue vizitis la mondfaman banlokon Baden-Baden, kie oni unue vizitis (sed nur por r i g a r d i ) la monludejon, la plej malnovan en Germanio kaj (laŭdire) la plej belan en la mondo. Post promenadoj oni veturis sur la altaĵojn de la norda parto de Nigra Arbaro, de kie oni ĝuis belegan panoramon al la Rejn-ebenaĵo ĝis la montoj Vogezoj en Francio.
Apud la fama lageto Mummelsee, kiun jam priskribis la eminenta germana poeto Grimmelshausen en sia fama verko "La aventuroj de Simplicius Simplicissimus", oni haltis por promenado ĉirkaŭ la lageto. Freudenstadt, konata turisma loko en Nigra Arbaro, estis la posta celo. Post kafopaŭzo oni reveturis tra la idilia Renchvalo kaj haltis en Lautenbach, por tie rigardi la pilgriman preĝejon, veran juvelon el la malfrua mezepoko.

Aparte alloge estis observi la laboron de tortobakisto, kiu pretigis la faman ĉeriztorton de Nigra Arbaro, kiun la gastoj tuj poste rajtis konsumi. Ankaŭ lignoskulptiston oni povis observi dum laboro kaj tre interesa estis ankaŭ la vizito al la malgranda, sed riĉenhava urba muzeo, kiu havas priskribon de la eksponaĵoj eĉ en Esperanto.
Oberkirch nomiĝas "urbo de la vino de la regiono Ortenau". Tial vingustumado en la loka vinprodukta kooperativo ne mankis. Tuj poste oni trairis la proksiman kaj sufiĉe longan Esperanto-straton. Promenado al la kastel-ruino Schauenburg kaj la multaj vitejoj kompletigis la varian programon.
Dum pluva vetero, kiu unu fojon malebligis migradon, Walter Poppeck montris diapozitivojn pri la plej bela parto de la Rejn-valo inter Bingen kaj Koblenz. Vespere la partoprenantoj kunvenis en ĉiam alia gastejo de Oberkirch, kie oni ĉe glaso da bona vino aŭ alia trinkaĵo gaje kaj senĝene povis interbabili. La adiaŭan vesperon organizis la naturamikoj subĉiele, aranĝante kradrostadon de kolbasoj kaj stekoj. La gastoj senrezerve esprimis sian kontenton pri la organizado kaj la harmonia etoso, kiu regis en la kvazaŭ familia antaŭkongresa rondo.

KRITIKI ESTAS FACILA
Tio koncernas ĉefe atakintojn de la Akademia Teorio de la vortfarado, kiun multaj atakis kaj ĝis nun neniu anstataŭa teorio aplikebla al instruado aperis. Tamen ...

### TAGO DE LA PACO

Kiel ni jam informis en la unua eldono de LA STROBILO, la hodiaŭa lundo estas "Tago de la Paco". Krom la jam menciitaj prezentaĵoj vi povos ĝui hodiaŭ rekte post la mondpremiero de la "Aŭgsburga Kretocirklo" alian premieron:

La kabaredaĵo **La Pinto** estas verkita speciale por la UK en Aŭgsburgo. **Stefan Maul**, redaktoro de MONATO, verkis ĝin okaze kaj sur la fono de l' 2000jara jubileo de Aŭgsburgo kaj plektis en ĝin aktualajn problemojn de paco kaj malarmado. Ke por tio li elektis la formon de satiro kaj kabaredo, ebligas al li, sufiĉe akre reliefigi la temon.

Pliajn detalojn pri la diversaj teatraĵoj vi trovas en la koncernaj programfolioj.

Pri la Tago de la Paco kaj la japanaj kontribuaĵoj al ĝi vi ricevis apartan broŝuron en la kongresa dokumentujo.

**Domaĝe** estas sendube, ke pro evidenta misplanado oni metis la kunvenon kun la temo La Tago de la Paco **samhore** kun **Kretocirklo** kaj **La Pinto** en la programon. Nun restas al vi nur elekti inter ambaŭ ...

S. Maul


**Se vi ankoraŭ ne konas la unikan E-revuon**
**MONATO**
**internacia magazino sendependa**
dum la tuta kongreso vi havas okazon, ekkoni ĝin ĉe la stando de MONATO
De la ĉefenirejo de l' kongresejo iru en la dekstran angulon de la vestiblo. Vi ne pretervidos ĝin.


**Invito al inform-kunveno pri la**
AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ SAN MARINO

Hodiaŭ, lundon, alvenos el Moskvo speciala delegito de la Ministrino pri Kulturo de San Marino, por raporti al la interesitaj partoprenantoj de la 70a Universala Kongreso pri la situacio de la nun leĝe aprobita Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino.
S-ro Venturini raportos morgaŭ matene ek de la **10.00 horo** en salono **Ziegler** pri la detaloj de la koncerna leĝo. La unua prezidanto de AIS, profesoro d-ro Pennacchietti, raportos pri la programo de la ĉi-jara dua sesio de AIS, kiu okazos en San Marino de la 27a de decembro ĝis la 4a de januaro (1986).
Invititaj estas ĉiuj kongresanoj, kiuj finis ajnan universitat-nivelan studon. Bonvenaj estas proponoj de prelegoj kaj kursoj por la ĉi-jara AIS-sesio kaj proponoj de alvokindaj estontaj AIS-anoj.
La kunsidon, kiu probable daŭros ĝis la 12.00 h, gvidos la rektoro de IKU, profesoro d-ro Frank.
Estos preparkunsido (nepublika) de la **9.00 h ĝis la 10.00 h** samloke.





La kasedo haveblas en limigita kvanto en la kongresa libroservo.


**Jenas Lorcon Ohuiginn**, kongres-numero 275, Ottawa, salutas amike al verda familio kaj bedaŭras, ke malsano kaŭzas foreston, tamen kolektas ankoraŭ stenografiajn librojn kaj individuajn manskribojn kun biografio por la universala stenografia muzeo fondita en 1976.


ASOCIO DE VERDULOJ ESPERANTISTOJ (AVE)
prezentas:

NATURO KAJ SOCIO
**Enkonduko en ekologian pensadon kaj agadon**
**de Edgar Guhde**
ISBN 3-922570-40-2

Esperanto-Centro
Paderborn
Poŝtfako 1450
D-4790 Paderborn, FRG

1985

**HAVEBLA EN LA LIBRO-SERVO DE UEA**


**program-ŝanĝoj kaj aldonoj**

**Lunde:** La publika kunveno de **ILEI** okazos ekde la 9-a horo (kaj ne ekde la 8-a horo).

**Marde:** post **Agado ĉe UN"** de **9.00 h ĝis 10.00 h** en salono **Pickel** (jam anoncita en la unua STROBILO) okazos daŭrigo ĝis 11.00 h pri projekto **Unispace** (gvidos A. Wandel).

Atentu **medicinistoj**! Post la UMEA-kunveno okazos vizito al la urba malsanulejo de la 17a ĝis la 19a horo. Pliajn detalojn vi aŭdos dum la kunveno.

En "Poststüberl" de hotelo Post de la 10.30 ĝis 12.00 h: Uzu la okazon paroli inter amikoj kun d-ro **Victor Sadler**, ĝis antaŭ 2 jaroj direktoro de UEA kaj ek de tiam kunlaboranto de BONA ESPERO.

**Merkrede:** De la 11-a ĝis la 12.30a horo okazos administra kunsido de **AVE** (Asocio de Verduloj-Esperantistoj).
Je la 17-a horo komenciĝos **ekumena diservo** en la preĝejo St. Ulrich. Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista invitas al tiuj diservoj ankaŭ la aŭgsburgajn civitanojn.

**Sankta Meso** okazos je lundo (5 aŭg), mardo (6 aŭg), merkredo (7 aŭg), vendredo (9 aŭg) je la 12h15 en la preĝejo S-ta Antonio.
**Vespro** okazos lunde, marde kaj vendrede je la 17-a horo en la preĝejo S-ta Antonio.

